

En tiu ĉi numero, legu pri:

- Zamenhofa Metiejo en Baracoa
- Dankletero al E-instruistoj
- Regiona E-Renkontiĝo en Granma

La 22-a Zamenhofa Metiejo en Baracoa, la pejzaĝa urbo

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Baracoa estas urbo de la orienta provinco Guantánamo, kaj ĝia nomo devenas de la aravaka lingvo, kies signifo estas mar-ekzisto.

Baracoa, deklarita Nacia Monumento, estas la plej antikva urbo de Kubo tial ke ĝi estis la unua fondita de la hispanoj, la 15-an de aŭgusto 1511, kiam komenciĝis la insula koloniigo en la 16-a jarcento.

Ĝia nomo tiam fariĝis Vilaĝo de Nia Sinjorino de la Ĉieliro de Baracoa. Ĝi estas banata de la rivero Mielo kaj inter ties naturaj allogaĵoj estas ankaŭ la riveroj Toa kaj Yumurí, kaj la altaĵo Amboso de Baracoa.

Kaj precize en tiu ĉi urbo, ĉe la bela farmobieno Duaba, okazis E-renkontiĝo, sed ne kiu ajn renkontiĝo, sed la 22-a Zamenhofa Metiejo organizita de la E-grupo de Guantánamo.

La eventon partoprenis 44 kubaj esperantistoj plus tri gastoj el Germanio, Belgio kaj Hispanio. Okazis prelego kaj debato "Mitoj kaj faktoj pri Esperanto: valideco de la vivoverko de Zamenhof cent jarojn poste", proponita de Maritza Gutiérrez González, kiun aktive partoprenis tri laborgrupoj debatintaj kaj raportintaj pri la temo. Aliaj prelegoj temis pri Belgio, de Eddy Raats, kaj pri Esperanto-eldonoj de Monda Asembleo Socia (MAS), de Vilhelmo Lutermano.

Aldone okazis seminario en du laborgrupoj pri la Fortoj kaj Malfortoj cele al la venonta Internacia Librofoiro 2018 gvidita de Javier Ramos Nistal. Vespere oni spektis videomaterialojn, kantis, deklamis, kaj ankaŭ dancadis.

Ekskurso al la Vojo de l' Kakao estis tre interesa en la farmobieno Duaba, kaj ekskurso al la vilaĝcentro estis tre ĝuinda sperto aparte por tiuj, kiuj unufoje vizitis ĝin, tero de kakao kaj kokoso.

Ĝenerale la evento estis bonega sperto kaj la partoprenintoj esprimis sian kontenton kaj esperon denove partopreni la Zamenhofan Metiejon de Guantánamo en 2018.


Mi nur bedaŭras, ke pluraj malbonaj eventoj okazis, unue, la bedaŭrinda forpaso de la patrio de nia kara Leonardo Luna Neyra, piliero de la organiza teamo, kiu devis forlasi la eventon tuj ĉe la komenco. Lin solidareme akompanis Raúl Sánchez Guilarte per la helpo de Vilhelmo Lutermano; kaj aldone, je la fino, la aŭtobuso de la koncerna entrepreno tro malfruiĝis, kio provokis aliajn problemojn al grupo da partoprenintoj.

Tamen, tiaspecaj okazaĵoj neniel paligis la sukceson de tiu ĉi jam tre tradicia renkontiĝo.

Gratulojn al la teamo de la provinca grupo sub la gvido de Tirso Ávila Bory!



Supre, grupa foto de la partoprenantoj en la 22-a Zamenhofa Metiejo, dum ekskurso en la centro de Baracoa. Malsupre, detalo de turisma broŝureto pri Guantánamo, ĉefurbo de la samnoma provinco, kiun la organizantoj disdonis al la partoprenantoj. Foto: KEA.



Dankletero okaze de la tago de la Instruistoj en nia lando

Laŭ Rudolf Rakuša en *Metodiko de la Esperanto-instruado*, ĉiu instruisto de Esperanto estas la edukanto de centoj kaj centoj da estontaj esperantistoj, kiuj kunhelpas porti la torĉon de niaj ideoj. Bela estas lia/ŝia profesio, inda por venki malfacilaĵojn kaj rikolti sukcesojn. Li kaj ŝi formas kaj direktas samtempe kun la instruado de la Lingvo Internacia la psikon de la lernantoj al la altaj celoj de nia movado.

Estas kompreneble, ke la instruisto de Esperanto per siaj karakteraj kaj moralaj ecoj devas garanti la celojn de la edukado kaj instruado. Li kaj ŝi montru ne nur per la insigno sur sia vesto sed per sia tuta personeco, ke li kaj ŝi estas esperantisto en la plej nobla senco de ĉi tiu vorto, en la senco de humaneco.

Renato Corsetti, eksprezidanto de UEA, dum inaŭgura parolado en UK esprimis ke nia movado havas du esencajn taskojn: 1. Produkti esperantistojn; 2. Produkti servojn por la esperantistoj.

Niaj instruistoj kaj instruantoj estas tiklaj en la plenumo de tiuj ĉi du taskoj ĉar per iliaj lecionoj ili devas garanti ke la lernantoj ne nur lernu la lingvon, sed ankaŭ komprenu la celojn de Esperanto kaj engaĝu sin en aktiva agado favore al la disvastigo de la Internacia Lingvo. Li kaj ŝi laboru por ke la filioj kaj grupoj nepre produktu servojn por la novbakitaj kaj veteranaj esperantistoj kaj por ke la ligoj inter la Asocio kaj la lernantoj estu daŭre viglaj.

Nome de la Nacia Estraro de KEA, la Kuba ILEI-Sekcio kaj la estrarano pri Kapabligo agnoskas kaj dankas la laboron faritan kaj faratan de ĉiu unuopa instruanto tra la lando.

Kiom da energio, kiom da tempo, kiom da intelekta laboro, vi ĉiuj dediĉis al la instruado de la Internacia Lingvo dum tiuj ĉi jaroj.

Niaj elkoraj dankoj iru al: Leonardo Luna Neyra, Tirso Ávila Bory, Raúl Sánchez Guilarde, Roberto Cutiño Palau, Guillermo Navarro Toledano, Julio César Tamayo Salas, Gonzalo Collantes García, Graciela Morgado Rodríguez, Guillermo Bes Salazar, Rafael Cabrera Espinosa, Anyer Rafael Montero Ramos, Frank Michel Cedeño Estrada, Carmen Dubel Lachatagnerais Popa, Ramón Adolfo Coronado Vázquez, Reinaldo Pantoja Miállán, Isnel Pupo Peña, Magda Rodríguez Almaguer, Anida Santiesteban Garcés, Jorge Luis González Santillán, Jorge Dumois Santillán, Emilio Rodríguez Gómez, Ricardo Salazar Crespo, Amparado Cisnero Rovira, Norberto Díaz Guevara, Rosa Castañeda Guerrero, Yoandra Rodríguez Labrada, José Luis Montes de Oca Cárdenas, Eddy Machado Hernández, Porfirio Díaz Rodríguez, Alina Zuaznabal Himely, Jorge Abreu Junco, Enrique Pedroso Piñero, Juan Lázaro Besada Toledo, José de Jesús Campos Pacheco, Pedro Fernández Rodríguez, Miguel Ángel González Alfonso, Geomar Martínez Pérez, Ismary Lezcano García, Javier Ramos Nistal, Marta Alonso Gutiérrez, Niurka Alonso Santos, Mayra Núñez Hernández, Liudmila Kashtánova, Juan Carlos Montero Medina, Héctor Jiménez Batista, Vilhelmo Lutermano, Esteban Pérez Rodríguez, Orlando Raola González, Alexis Otero Castellón, Manuel Rodríguez Rábago, Maritza Gutiérrez González, Juan Ramón Rodríguez Gómez, Ariadna García Gutiérrez, Alberto Fernández-Calienes Barrios, Alberto Rodríguez Pineada, Fernando Paredes Elósegui, Olga Lidia Meneses Duarte, Andrés Rodríguez González, Andrés Piñera Prieto, Karmenĉu, René Valdés López, Francisco Briel de Cañas, Bárbara Oña Ventosa, Clarita Linton, Bárbaro Betancourt Estrada, Roberto Torres Álvarez, Gilberto Piñera Prieto, Justa Piñera, Juan de Dios Viant kaj aliaj kiuj nun ne venas en mian memoron sed certe kontribuis.

Ankaŭ al tiuj instruistoj kiuj jam forpasis: Cirilo Ramos Piñero, Jesús Castillo Jiménez, Martín Castro López, Raúl Juárez Sedeño, Pedro Pablo Lamas Díaz, Fabio Silegas Despaigne, Julio Martínez Fiallo, Elvira Tapia Batista, Rufino López Cepero, Socorro Castro Acosta kaj aliaj.

Feliĉan tagon de la instruistoj!

Feliĉan Kristnaskon!

Feliĉan novan jaron!

Respektoplene,

JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO

Estrarano pri Kapabligo



Supre de maldekstre kun la flago: Javier Ramos Nistal, Frank González González; sidantaj, de maldeskstre: Yordán Fonseca Olivera, Alina Miranda Busutil kaj Fráncel Briel Gil. Fotis: Miguel Ángel González Alfonso.

Esperantistaj gesportistoj en la maratono de 10 de Octubre

Kiel jam tradicie nia Asocio partoprenis ĉi-jare en la maratono de 10 de Octubre, la urboparto kie situas la Esperanto-Centro Havano, Kuba Esperanto-Asocio kunvokis kaj preparis kondiĉojn en la E-Centro por partopreni en la maratono per esperantista teamo. Ĉi-jare kuris en nia teamo 6 esperantistoj, krome ankaŭ estis kun ni en la maratono Cristóbal García Herrera kiel organizanto kaj Fráncel Briel Gil kiel volontulo de la Ruĝa Kruco. Ambaŭ instigis nin kaj helpis al la organizantoj de tiu loka maratono kiu konsistas el populara 5-kilometra distanco en la kvartalo de nia Asocio. Rimarkindas, ke en nia teamo Alina Miranda Busutil gajnis la trian premion en sia kategorio, kio ja estas unu el ĉefaj atingoj en la lastaj jaroj flanke de niaj reprezentantoj. Kvankam la maratono estas populara kaj partoprenas miloj da lernantoj, studentoj, laboristoj, najbaroj, ankaŭ partoprenas multaj profesiaj gesportistoj, eĉ tiel ŝi sukcesis esti inter la 3 unuaj el sia kategorio. Esperanto kiel ĉiam estis videbla, per niaj teamanoj kaj flagoj, ni modeste kontribuis al la sukceso de tiu popola aranĝo kaj ĉiuj E-sportistoj ĝuis sanan ekzercadon kaj utilan uzon de nia libertempo.

JAVIER RAMOS NISTAL

Esperantista semajnofino en la krisolo de la kuba kulturo

De la 26-a ĝis la 29-a de oktobro sesiis en la orienta provinco Granma, en la feriejo Los Cantiles, regiona E-renkontiĝo, dediĉita al Zamenhof kaj kun varia programo kiu inkluzivis prelegon pri la Zamenhofa itinero kaj la unua E-libro, konversacian kurson, debatondojn pri interesaj E-temoj, literaturan momenton pri José Martí kaj la agadoj de Martí-kluboj de Havano kaj Bayamo; ankaŭ ne mankis vizitoj al la banloko ĉe la rivero Los Cantiles, kie la esperantistoj pasigis belan kaj refreŝigan etoson ĉe la travidebla akvofalo. Partoprenis ĉ. 40 geesperantistoj el 7 kubaj provincoj, kiuj vigne laboris dum tagoj kaj ĝuis vesperan programon per videomaterialoj kaj muziko, teatra prezento kaj dancado. Aparte menciindas la kontribuoj de Wilfredo Díaz Hernández (Granma), Norberto Díaz Guevara (Sancti Spíritus), Tirso Ávila Bory (Guanatánamo), dum la vespera programo, kaj Frank Cedeño Estrada, prezidanto de la provinca filio. Sendube la regionaj renkontiĝoj en diversaj provincoj donas okazon al la lokaj filioj kaj grupoj mem plani kaj evoluigi sian surlokan agadon; ankaŭ ebligas al la kubaj esperantistoj viziti aliajn regionojn kaj urbojn kaj tiel pli koni sian propran landon danke al la E-agado. Gratulon al la organiza teamo de la Provinca Filio Granma, kiun gvidas Frank Cedeño Estrada, Anyer Rafael Montero Ramos, Yoan Girón Pacheco kaj Rafael Cabrera Espinosa. Ĝis la venonta!

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ



Partoprenintoj paŭzas por la grupa foto, memoraĵo pri bona E-renkontiĝo ĉi-foje en la feriejo Los Cantiles, kun alloga programo, en rava naturo, kiu jam fariĝis tradicia kaj kun ĉeesto de esperantistoj el pluraj provincoj. Fotis: Anyer Rafael Montero Ramos.

Somera programo en Havano

La nova estraro de la Provinca Filio de KEA en Havano, sub la gvido de Niurka Alonso Santos, kiu prezidas ĝin, ĉi-jare denove organizis Someran Programon jam por la 4-a fojo.

De antaŭ kelkaj jaroj tiaj programoj furoris kaj estis tre ŝatataj de nia membraro en Havano.

Bedaŭrinde ili perdis kvaliton kaj en la lastaj jaroj apenaŭ estis organizitaj altkvalitaj kaj enhaviĉaj programeroj, sed feliĉe tio draste ŝanĝiĝis en somero 2017.

La Estraro de Filio Havano serioze decidis organizi programerojn kaj kiel rezulto havananaj povis ĝui 7 aranĝetojn dum julio kaj aŭgusto. Jen ili:

- Kursfina aranĝo kaj malfermo de la somera programo
- Vizito al la Muzeo de la Revolucio
- Kultura aranĝo "Falis Stelo". Babilado kun trinkaĵoj ĉe la Havana Moleo
- Grupa vizito al plaĝo
- Promenado kaj vizito al la glaciaĵejo Coppelia
- Partopreno en la internacia retaranĝo Paralela Universo
- Fermo de la somero per festo kaj grupa naskiĝtaga festo.

Certe tiaj aranĝoj ripetiĝos en 2018. Bona sperto kiu okazis simile en aliaj provincoj kie esperantistoj ankaŭ kune ĝuis la feriojn kaj la someron.

JAVIER RAMOS NISTAL
kaj ROBERTO NÚÑEZ SILVA




NEKROLOGOJ



Cirilo Ramos Piñero

(La Habana, 1948.07.09–2017.11.19). Esperantistiĝis en 1992 kaj tuj ekinstruis la lingvon. Estis aktiva aganto en la Provinca Filio Havano kaj ĝia prezidanto dum du periodoj. Individua Membro de UEA kaj Komitatano de KEA. Partoprenis plurajn naciajn eventojn, aktivis en la ILEI-Sekcio; prelegis kaj verkis originale en Esperanto. Membris la Komisionon pri Historio de Esperanto en Kubo de 1997 ĝis sia forpaso.



Elia Dorcas Fonseca Ramírez

(Bayamo, 1925.04.18–2017.12.20). Esperantistiĝis en 1990. Estrarano de la Provinca Filio de KEA en Granma, senĉesa kontribuanto al la stabileco de la movado en urbo Bajamo. Ŝi entuziasme partoprenis plurajn naciajn aranĝojn, inter kiuj la UK-oj en 1990 kaj 2010, kaj afable gastigis esperantistojn en sia domo dum seminarioj, kursoj kaj vizitoj de estraranoj de KEA.

Kuba Esperanto-Asocio kondolencas al familianoj kaj geamikoj.

Ekde la 3-a numero, Esperanto estas oficiale menciata sur la paĝaro de la Unesko-retejo, kaj en ĉiuj lingvaj versioj de la *Kuriero*. La Esperanto-versio estas elŝutebla ĉe la Unesko-retejo <https://en.unesco.org/courier/about>.

Subtenu la projekton per viaj elŝutoj ĉe la Unesko-retejo kaj financa donaco al la UEA-fondaĵo Unesko (*Kuriero*).

INFORMILO n-ro 4 (ĝis 2017-08-30, CUP)

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 2017 (79)

★ **La Habana (36):** Alberto Fernández-Calienes Barrios, Alberto Rodríguez Pineda, Alejandro García Acosta, Ángela María Pedrosa Cuesta, Ariadna García Gutiérrez, Charlie Joan Obregón Cepero, Daimi Doval Delsa, Digna Mayra Morales Burón, Geomar Martínez Pérez, José Evelio Cárdenas Zúñiga, José Luis Hernández Carvajal, Juan Carlos Montero Medina, Juan Ramón Rodríguez Gómez, Julián Hernández Angulo, Luis Enrique Rizo García, Luis Enrique Sotolongo Gilchrist, Magaly Valdés Serrú, María Antonia Cartaya Martínez, Maritza Gutiérrez González, Marta Eugenia Alonso Gutiérrez, Mayra Núñez Hernández, Miguel Ángel González Alfonso, Olga Lidia Barrios Cunningham, Oscar Asensio Pisciotta, Pedro Fernández Rodríguez, Teresa Cepero Tejeda, Vilhelmo Lutermano, Yordán Fonseca Olivera, Noel González Fernández, Ismary Lezcano García, Ramón García Tarragó, Raquel Rodríguez Ramírez, Liudmila Kashtáno-

va, Magaly Molina Suárez, Ariel Lima Pérez, Rolán Dik Ramírez González. ★ **Mayabeque (1):** Yuniór Benítez Alonso. ★ **Matanzas (1):** Alejandro Tilán González. ★ **Cienfuegos (1):** Alina Zuaznabal Himely. ★ **Villa Clara (13):** Dunieski Aguilera Barrera, Eddy Machado Hernández, Ena González Machado, Manuel Antonio Fuentes Gary, Nadia Peeva Miteva, Noelys Caridad González Hernández, Roberto Molina Gálvez, Yusimith Barrera Camacho, Francis E. Molina León, José Luis Montes de Oca Cárdenas, Raicel García Pérez, Julio César Díaz Casañas, Yoan Claro Águila. ★ **Sancti Spíritus (1):** Yoandra Rodríguez Labrada. ★ **Ciego de Ávila (1):** Amparado Cisnero Rovira. ★ **Camagüey (1):** Jorge Luis González Santillán. ★ **Las Tunas (2):** Anida Santiesteban Garcés, Juan Miguel Leyva Carralero. ★ **Granma (1):** Yoandris Pompa Valdespino. ★ **Santiago de Cuba (12):** Pablo Cabrera Toledano, Guillermo Navarro Toledano, Osiris de la C. Salas Madrazo, Jaime Ginarte Díaz, Graciela Morgado Rodríguez,

Manuel Muñoz Laffita, Francés Guibert Sorzano, Julio César Tamayo Salas, Adaelsi Castellanos Pérez, Amilkar Fajardo Morgado, Leonel Pastrana Rivera, Camilo Miranda Ugás. ★ **Guantánamo (9):** Asiel Torres Laurencio, Iliagne Torres Jardines, Julia Lescaille Fernández, Leonardo Luna Neyra, María Lisandra González Hurtado, Miguel Luis Vera Challinger, Roberto Claro Guerrero, Tania Laurencio Molina, Tirso Ávila Bory.

DONACOJ (3 243.00)

★ **Martí-Klubo (1 420.00):** Olga Lidia Barrios Cunningham (100.00), María Antonia Cartaya Martínez (50.00), Pedro Fernández Rodríguez (200.00), Vilhelmo Lutermano (1 000.00), Ángela Pedrosa Cuesta (70.00), Maritza Gutiérrez González (72.00). ★ **Fonduso Instruado (2 159.00):** Pedro Fernández Rodríguez (200.00), Lotumado dum KERO 2017 (215.00), Aŭkcio dum KERO 2017 (250.00), Vilhelmo Lutermano (1 088.00).
Al ĉiuj donacintoj KEA tre kore dankas.



Universala Esperanto-Asocio (UEA) ligas Esperanto-parolantojn tra la tuta mondo. UEA organizas Esperanto-kongresojn, kunordigas landajn kaj fakajn asociojn en pli ol 120 landoj. Ĝi eldonas librojn kaj gazetojn en Esperanto, subtenas kursojn kaj kulturajn eventojn. Kiel Ne-Registara Organizaĵo (NRO) ĝi partoprenas la agadojn de UN kaj UNESKO kaj laboras por lingva justeco en la mondo.

Fariĝu Individua Membro de UEA!

Kuba Esperanto-Asocio
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba
+53 7 640 4484
Info@esperanto.co.cu
www.esperanto.cult.cu



9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto



Havano, Kubo
11-17 februaro 2018

Informoj kaj aliĝilo ĉe:
www.esperanto.cult.cu

*Lingvoj kaj kulturoj:
edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj*

**Amika voĉo el Kubo,
libera teritorio
en Ameriko**

www.radiohc.cu/eo

RADIO HAVANO KUBO
Kurtondaj kaj retaj elsendoj en Esperanto
Nun ankaŭ en FM!



esperanto.cu estas trimonata bulteno por komitatanoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. PDF-versio elŝuteblas ĉe www.esperanto.cult.cu. **Cefredaktis kaj enpaĝigis:** Alberto Fernández-Calienes Barrios. **Kunlaboris:** Javier Ramos Nistal, Maritza Gutiérrez González, Juan Ramón Rodríguez Gómez.